



DEMANDARO kaj RESPONDARO  
POR LA  
ELEMENTA KURSO DE ESPERANTO  
DE LA  
HISPANA ESPERANTO-INSTITUTO



MADRID

Presejo de «El Financiero», S. A.

Strato de Ibiza, 13

1 9 2 8

L  
278

R-278



DEMANDARO kaj RESPONDARO  
POR LA  
ELEMENTA KURSO DE ESPERANTO  
DE LA  
HISPANA ESPERANTO-INSTITUTO



MADRID  
Presejo de «El Financiero», S. A.,  
Strato de Ibiza, 13  
1 9 2 8

# ELEMENTA KURSO

Ĝeneralaj normoj donitaj de la HISPANA ESPERANTO-INSTITUTO por unuigi la lernadon de la lingvo Esperanto. Laŭ ili, jen la Programo, kiun lernanto nepre devos ampleksigi per studado de la lingvo sur kiu ajn el gravaj kaj kompletaj lernolibroj ekzistantaj.

## I.<sup>a</sup> LECIONO

DEMANDARO: I. Origino. nomo, neceso, fundamento kaj disvolviĝado de la internacia helpa lingvo Esperanto.—II. Nomo, prononcado aŭ elparolo, fonetiko kaj reguleco de la literoj de ĝia alfabeto.—III. Distribuo de ĝiaj silaboj kaj prozodio de ĝiaj vortoj aŭ paroloj.—IV. Klasoj el vortoj, kiujn enkalkulas Esperanto kaj reguloj pri ilia akcento kaj pri la esperanta interpunkcio.—V. Mallongigoj plej oftaj.

RESPONDARO: I. Ludoviko Lazaro Zamenhof, ĉe la Seminario de Bialystock (kie li naskiĝis) spertis pri la diverseco de lingvoj, ĉar li havis kamaradojn hebreaajn, polajn, rusajn kaj germanajn, kiuj

ofte interbatalis, malamante unu la alian, kaj li konsciis kaŭzo de tiu malamo kaj de tiuj interbataloj la diversecon de lingvoj kaŭzantan malkomprenon, kaj ke la sama kaŭzo apartigadas la popolojn kaj naskas militojn inter ĉiuj. Pro-ĉi tio, li, de sia plej granda juneco, celis doni al la Homaro facilan neŭtralan helpan lingvon internacian, kaj li ĝin elpensis.

Je 1887, li publikigis malgrandan libron, oni povas diri broŝuron, priskribantan sian elpensitan lingvon sub pseŭdonimo D-ro Esperanto (aktiva participo de la verbo *esper* koncernanta en ĉi-tiu okazo *personon, kiu havas esperon, tiun, kiu esperas*), pro kio oni alnomis la lingvon per la pseŭdonimo.

La moderna vivo ĉiujfoje postulas pli kaj pli *duan lingvon* por la konstanta interrilatiĝado de la popoloj, de ĉiuj vidpunktoj, socialaj, religiaj, sciencaj, kulturaj, ekonomiaj, literaturaj, komercaj, k. c.; des pli kaŭze de tre oftaj internaciaj kongresoj, konferencoj kaj kunlaboradoj, por kiuj diverseco de lingvoj estas granda malfacilaĵo, kaj ankoraŭ des pli pro la triumfo de la aeroplano kaj de la Radio, por kiuj estas absolute nepra komplemento la dua lingvo: Esperanto, vivanta lingvo de vivanta tutmonda popolo.

Esperanta bazo konsistas el *primitivaj vortoj, radikoj komunaj al la plimulto el la nuntempe parolataj lingvoj de Eŭropo; el la nevarieco de la radikoj, afiksoj kaj finaĵoj, kaj el kelkaj principoj pri neceseco, sufiĉeco kaj klareco, krom el aliaj ne tiel gravaj, ĉio ĉe la plej firma fideleco al la FUNDAMENTO de la lingvo.*

La agadkampo de Esperanto estas tre vasta en la tuta mondo: Katolikismo, Protestantismo, Bahaismo, Oomotismo kaj aliaj moralaj movadoj ĝin uzas por siaj celoj; same ĝin uzas multenombraj internaciaj Asocioj kaj Ligoj, el ĉi-tiuj, tiu de la Ekssoldatoj de

la terura ĵus pasinta milito el ĉiuj nacioj; oni instruas ĝin kvankam nedevige en multenombraj unugradaj lernejoj de Ĉeĥoslovakujo, Saksujo, Anglujo, Aŭstrujo, Germanujo kaj Rusujo, kaj ne tiel vaste en aliaj landoj, sed en Japanujo la movado estas tre forta kaj vigla en Seminarioj kaj Universitatoj, super ĉio en la Fakultatoj pri Medicino, en kiuj oni anstataŭas la terminaron per la esperanta terminaro; oni deklaris Esperanton LINGVO KLARA por la telegrafo; multenombraj Kongresoj ĝin akceptis kaj uzas; Komercaj Ĉambroj, Turismaj Oficejoj, Internaciaj Foiroj, iuj Fervojaj Ministerioj, Sciencistoj, Kuracistoj, Instruistoj, k. c., Ligo de Nacioj, Internacia Laborista Centra Oficejo, Ruĝa Kruco kaj aliaj Institucioj ĝin uzas pli-malpli. Multenombraj Radistacioj disaŭdigas regule esperante; la Aerlinioj Farman instruas esperante siajn pilotojn, k. c. Universala Esperanto-Asocio havas Delegitojn en pli ol dumil gravaj urboj de la tuta mondo; nia multenombra libraro enkalkulas tekstojn pri ĉiaj aferoj de la homa scio (la Centra Biblioteko de Parizo havas proksimume 6000 librojn); oni eldonas proksimume TRIDEKKVIN esperantajn gazetojn en pli da KVINDEK lingvoj; oni okazigis ĝis nun deknaŭ Universalajn Kongresojn de Esperanto, kiujn partoprenis esperantistoj el ĉiuj lokoj de la terĝlobo (39 nacioj en tiu de Danzig); en multenombraj nacioj estas naciaj Asocioj por la propagando kaj disvastigo de Esperanto. Esperanto havas sian Akademion de la Lingvo kun reprezentantoj el ĉiuj lingvoj de civilizitaj landoj, kaj nun ekzistas NAŬ Esperanto-Institutoj. Multenombraj tutmondfamaj eminentuloj favore opiniis pri Esperanto, el ili jen: *Reclus, Gorki, Tolstoj, Pi y Margall, Max Müller, Conde Hayashi, Nitobe, generalo Lemán, Henry Barbusse, Pio X, Romain Rolland, Nitti, Charles*

*Richet, Charles Baudoin, Rabindranath Tagore, Han Ryner, Jozefo Balazza, Firmin Gémier, Ferdinand Bouisson, k. c.*

II. Oni nomas kaj prononcas la vokalojn same kiel en hispana lingvo, tute klare, *•Kun la buŝo larĝe malfermita•*; oni nomas la konsonantojn aldonante al ĉi-tiuj la vokalon *o*, kaj multajn el ili oni prononcas ankaŭ same, kiel en hispana lingvo, sed aliajn ne, kaj estas necese aranĝi, pretigi speciale, la buŝajn organojn, kiuj produktas la sonon ĉiuokaze, por atingi la plej korektan prononcadon, por kio la lernanto utiligos la gramatikojn kaj la klarigojn de la profesoro, ĉiam atentante, ke la lingvo postulas kiel eble plej klaran kaj ĝustan prononcadon por ke la interkompreniĝo estu facila, parolante malrapide, kaj estas rimarkinde, ke estas facile atingi bonan prononcadon per iom da atento kaj farante prononcadekzercojn.

Ĉiuj literoj estas absolute fonetikaj, ĉar ne estas literoj mutaj, ĉiu havas sian sonon, kaj ĉiu sono havas sian precizan literon.

III. En Esperanto ĉiu vokalo formas silabon, ĉu sola, ĉu akompanate de unu aŭ iuj konsonantoj. La *ŭ* ne estas vokalo, estas nur sono, pro kio ĝi ne formas apartan silabon; la *j*, kiam ĝi sonas kiel *i* ĉe fino de vorto aŭ post vokalo kaj sekvate de alia konsonanto, ankaŭ ne estas vokalo. La prozodia akcento ĉiam falas sur la antaŭlasta silabo de ĉiuj vortoj, kaj la esperanta interpunkcio estas pli-malpli tiel sama kiel en ĉiuj aliaj lingvoj.

IV. Kvin klasoj el vortoj estas en Esperanto: PRIMITIVAJ (artikolo, personaj pronomoj, radikaj numeraloj, adverboj, prepozicioj, konjunkcioj kaj interjekcioj); SIMPLAJ (radikoj kun respektiva finaĵo: *libr-o*, *ĉeval-o*) KUNMETITAJ (unu aŭ du radikoj kun afikso aŭ afiksoj, aŭ sen ĉi tiuj, kaj kun la finaĵo:

*manĝo-ĉambr-o, urb-estr-o, bo-frat-in-o*); INTER-  
NACIAJ (alprenitaj el la greka aŭ latina lingvoj (kiel  
*teatr-o, teleskop-o*); kaj FREMDAJ (alprenitaj el la  
naciaj lingvoj, kiel *tualet-o, polk-o*).

V. La plej oftaj mallongigoj en Esperanto estas:  
*e = ekzemple; k. a. = kaj aliaj; k. s. = kaj simi-  
laj; k. c. = kaj cetere; k. t. p. = kaj tiel plu; t. e. =  
tio estas; D-ro = Doktoro; D-rino = Doktorino;  
S-ro = Sinjoro; S-ino = Sinjorino; F-ino = Fraŭ-  
lino; P-ro = Profesoro; K-io = Kompanio, k. c.*

## II.<sup>a</sup> LECIONO

DEMANDARO: I. Artikolo, formo, ĝia celo, ne-  
ŝangebleco, aplikado kaj forigo de ĝia vokalo.  
II. Nomo, ĝia karakterizo, gramatikaj formoj, ĝia  
deklino, formado de la seksoj, de la nombroj kaj  
de la kazoj.—III. Vortoj, kiuj povas prezenti la fina-  
ĵon de la akuzativo; kiam oni povas apostrofi la no-  
mon.—IV. Adjektivo, ĝia karakterizo, divido, ĝiaj  
gramatikaj formoj, ĝia deklino, formado de ĝiaj  
nombroj kaj kazoj; ĝiaj gradoj de komparo; loko de  
la adjektivo en la frazo.—V. Primitivaj aŭ radikaj  
numeraloj kaj formado de la senfina serio de nom-  
broj, de la ordaj, de la kolektantaj, de la frakciaj, de  
la multiplikantaj, de la distribuantaj kaj de la ripetan-  
taj.—VI. Formado de la komparanta grado pri  
kvanto.—VII.—Klarigo de la prefiksoj BĜ, GE kaj  
MAL.—VIII. Klarigo de la sufiksoj AĈ, AD, AJ,  
AN kaj AR.

RESPONDARO: I. ARTIKOLO estas parto de la  
propozicio uzata por limigi la sencon de la nomo  
antaŭ kiu ĝi iras, por ne konfuzi la nomon, pri kiu  
jam oni parolis. kun alia de la sama speco, kaj ĝi  
havas unu solan formon por ĉiuj nombroj, seksoj  
kaj kazoj, la formon LA : LA *hundo mordis LA ka-*

*tinon*. Kiam nomo ne estas akompanata de la artikolo en Esperanto, la hispana traduko devas esprimi la hispanan nedifinitan artikolon. Ĝi estas absolute neŝanĝebla.

Ĝia celo aŭ rolo estas akompani la nomon por montri ĉi tiun, laŭ oni diris, evitante konfuzojn: *oni aŭdis LA ventegon*; determini la universalan aŭ ĝeneralan nomon, enkalkulante en unu sola vorto ĉiujn individuojn de la sama speco: *LA ŝuisto* (t. e., ĉiuj ŝuistoj) *faras ŝuojn*. Oni ne uzas ĝin, tamen, antaŭ propra nomo, escepte kiam ĉi tiu estas determinata iel: *Petro estas amiko de Johano*; *Elizabeto I<sup>a</sup> helpis LA eltrovinton de Ameriko*. Neniam oni uzas ĝin post *ĉiu*, *ĉiuj*, *kies*. Pli preferinde estas ne uzi la artikolon, ol trouzi ĝin.

Oni povas forigi la *a* de la artikolo laŭ memvolo, sed ĉiam, kiam ĝi iras post prepozicio finiĝanta per vokalo, aŭ kiam ĝi iras antaŭ nomo komenciĝanta per vokalo. Tamen, dezirinde estas ne apostrofi ĝin kaj estas rimarkinde, ke la plej ĝenerala apostrofado de la artikolo estas post la prepozicio *de*: *la bela sonĝo de l'Homaro*. La poezio, por ŝpari silabon, apostrofas la artikolon laŭ oni diris, sed ankaŭ kiam nepre necese.

II. *Nomo* estas parto de la propozicio, kiu taŭgas por nomi la personojn, bestojn, lokojn, aĵojn, kaj pli simple oni povas difini ĝin dirante: nomo estas ĉio, kion oni povas konti: *Lazaro, kato, kastelo, virto, telero, kofro*, k. c.; *unu, du, tri, kvar, katoj, kaj kvin kasteloj; dek teleroj*, k. c.

La karakterizo de la nomo estas la finaĵo *o*: *papero, inko, mano*. Deklinacio konsistas el la diversaj manieroj, kazoj, per kiuj la nomo prezentiĝas, ĉu sola, ĉu akompanata de prepozicioj; tial la *kazo* estas unu el ĝiaj *du formoj*, kaj la *alia* estas la *numero*, tiu, do, laŭ la deklinacio, kaj la *numero* laŭ la



*nomo* koncernu *unu* aŭ *plurajn* *individuojn* aŭ *aĵojn*.

La esperanta deklinacio de la *nomo* nur atentus du kazojn: la *nominativon* kaj la *akuzativon*, kaj ĉi tiu neniam iras kun prepozicio, sed ĉiam finiĝante per la konsonanto *n*. Tamen, kaj tial ke prepozicioj regas la aliajn manierojn por prezentiĝi la *nomo*, kiuj estas samaj, kiaj la ceteraj kazoj de la deklinacio, jen ĉi tiu: *nominativo*, *la suno*; *genitivo*, *de la suno*; *dativo*, *al* aŭ *por la suno*; *akuzativo*, *la sunon*; *vokativo*, *ho, suno!*; *ablativo*, *kun, de, en, ĉe, per, sen, sur, pri, super, trans, preter la suno*.

La esperanta *nomo* nur havas *sekson*, kiam ĝi koncernas personon aŭ lian profesion, metion aŭ okupon, kaj beston; kaj oni formas la *virinsekson* intermetante la sufikson *in* inter la radikoj kaj la finaĵo: *Patro, patrino; tajloro, tajlorino*.

Oni formas la *multenombbron* aldonante la konsonanton *j* post la finaĵo; *ĉapelo, ĉapeloj*.

III. En Esperanto, fojojn, iuj nomoj alprenas, la finaĵon *n* de la akuzativo kvankam ili ne estas akuzativoj, sed en precizaj okazoj, kaj jam ĝustatempe oni klarigos la alprenon de la *n*, ĉar ankaŭ ĉi tiun alprenas adjektivoj, pronomoj, participoj kaj lokaj adverboj.

Nur oni devas apostrofi nomon kiam ĝi estas laŭ ununombra nominativo, t. e., kiam ĝi finiĝas per *o*, en la poezio, kaj, tamen, estas rekomendinde fari tion kiel eble plej malofte, eĉ eviti tion.

IV. *Adjektivo* estas la parto de la propozicio, kiu *kvalifikas* aŭ *determinas* la nomon aŭ la pronomon aŭ aĵon, kiun reprezentu tiu; e: *verda, estelo; li estas diligenta; kiam estas uzata post tiam*. La karakterizo de la adjektivo estas la vokalo *a*; e: *alia, granda, blanka*, k. c., kaj oni dividas ĝin laŭ la roloj montrataj de la difino: *kvalifikanta* kaj *determinanta*; e: por la unua, *bela rakonto*; por la dua, *tia ponto. mia*

*libro*. La kvalifikantaj esprimas *klason, formon, dimension* kaj *koloron* de la nomoj: *malbona frukto, ronda tablo, larĝa rivero, blua kitelo*; la determinantaj donas al la nomo ideon pri *posedo, indiko, kvanto* aŭ *nombro, ordo*, kaj fojojn pri *vageco*, ricevante aliajn nomojn respektive: *adjektivoj posesivaj, demonstraĵaj, numeralaj kaj nedifinitaj*.

La gramatikaj formoj, deklinacio, nombroj kaj kazoj, de la adjektivo estas samaj, kiaj estas por la nomo kun kiu akordiĝas laŭ nombro kaj kazo: *ni trairas multajn landojn; ni havas esperantajn gramatikojn en pli ol kvindek lingvoj kaj ankaŭ bonajn vortarojn*. Multenombro kaj akuzativo de la adjektivo formiĝas same, kiel tiuj de la nomo: *alta, altan, altaj, altajn*.

Ĝiaj gradoj estas tri: *pozitiva, komparativa, kaj superlativa*. La unua esprimas simple la signifon pri kvalito, kondiĉo aŭ cirkonstanco de la nomo al kiu ĝi kuniĝas: *bona infano, terura leono*; la komparativa esprimas la komparon de la kvalito de nomo kun tiu de alia nomo koncerne *pli altan gradon, saman gradon, malpli altan gradon*, t. e., komparativo pri *supereco, egaleco kaj malsupereco*. Oni formas la unuan per la partikuloj *pli kaj ol*; e: *la karbo estas pli nigra, ol la kafo*; la duan per *tiel... kiel, la rozo estas tiel bela, kiel la dianto*; la trian, per la partikuloj *pli kun mal* antaŭe kaj *ol: la kafo estas malpli nigra, ol la karbo*. La superlativo esprimas la signifon de la adjektivo laŭ la plej alta grado, kaj ĝi povas esti *absoluta kaj relativa*: oni formas la absolutan antaŭmetante la adverbbon *tre* antaŭ la adjektivo, aŭ aldante al la radikoj ĉe la fino, inter ĝi kaj la finaĵo, la sufikson *eg*; e: *tre bela, belega*. Oni formas la relativan per la sekva de *plej kaj el*, kiam ĝi koncernas *superecon*, e: *vi estas la plej studema el ĉiuj*, kaj kiam ĝi koncernas *malsuperecon*, oni antaŭmetas

*mal* al la partikulo *plej*, e: *la esperantaj gramatikoj estas la malplej multekostaj el ĉiuj gramatikoj*. Kiam la superlativo koncernas du personojn, bestojn, k. c., oni uzas la sprimmanieron de la komparativo, e: *el miaj du amikoj la pli riĉa estas Ferdinando*.

Ĝenerale la loko de la adjektivo estas antaŭ la nomo: *internacia helpa lingvo*.

Oni konas la kazon de la dua termino de la komparativo kompletante pense la frazon: *mi amas vin pli, ol (mi amas) fraton; mi amas vin pli, ol frato (amas vin)*.

V. La radikaj numeraloj estas fundamentaj kaj primitivaj vortoj, kiujn oni devas lerni parkere: *unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, cent, mil, miliono, miliardo*. Oni formas la ceterajn tute logike laŭ la jena regulo: kiam la malgranda numero sekvas la grandan, oni sumas al ĉi tiu tiun kaj tiel *dek ses (dek + ses)*; kiam la granda sekvas la malgrandan, unu multiplikas la alian, tiel *sesdek (ses × dek)*. Oni formas la *ordajn* per aldono de la *a* al la radikaj: *tria, naŭa, deka, centa*, sed se ili estas kunmetitaj, nur la lasta ricevas la *a*: *naŭdeksepa, milnaŭcentdudeksepa*. Ĉiam en Esperanto oni uzas la ordajn numeralojn: *tridekria paĝo*,

Oni formas la *kolektantajn* aldonante al la primitivaj la sufikson *op* kaj fine la *a*, sed oni devas atenti, ke ili koncernas individuojn, ekzemplerojn, specimenojn, de la sama speco: *duopa marŝado; kvaropa atako*. Se oni finas ilin per *e* anstataŭ per *a*, la kolektantaj estas adverboj: *la soldatoj atakis centmilope dum la terura krima milito*.

Oni formas la *frakciajn* per aldono de la sufikso *on* al la primitivaj, kaj ili esprimas parton aŭ partojn el tuto: *kvarona parto de la peseto estas dudek kvin centimoj*. Oni devas atenti, ke pere la logika formado de la vortoj, anstataŭante la finaĵon *a* per

*o* aŭ per *e*, oni formas frakciajn nomojn kaj adverbojn.

Oni formas la *multiplikantajn* per aldono de la sufikso *obl*, same kiel por la antaŭaj, kun la finaĵo *a*, kaj ili esprimas kiom da fojoj unu nombro estas entenata en alia. Ankaŭ ili povas esti nomoj aŭ adverboj: *duobla pago, la dekoblo de ses estas sesdek, trioble*.

Oni formas la *distribuantajn*, t. e., tiujn, kiuj respondas la demandon *kiom da (libroj) estas por ĉiu el ni?*, metante antaŭ la primitivaj la partikulon *po*: *po ses libroj*.

Oni formas la *ripetantajn* per la vorto *fojo* en multenombro post la primitivaj, aŭ kunigante al la primitivaj *foje*, formante tiel adverbon: *tri fojojn aŭ trifoje*.

Facile estas konscii, ke ĉiuj numeraloj finiĝantaj per *a* aŭ per *o* sekvas la ĝeneralajn regulojn por formi la multenombrojn kaj akuzativon.

VI. Kiam la komparativo koncernas kvanton, tiam oni formas la gradojn de *supereco* kaj *malsupereco* aldonante al *pli*, *malpli* kaj *ol*, la prepozicion *da*; kaj la gradon de *egaleco*, anstataŭante *tiel* kaj *kiel* per *tiom da* kaj *kiom da* respektive; e: *la inĝeniero konstruis pli da pontoj, ol da ŝoseoj; ŝi aĉetis tiom da piroj, kiom da persikoj; la ĝardeno havas malpli da rozoj, ol da siringoj*.

VII. La prefiksoj *BO*, *GE* kaj *MAL*, signifas, t. e., donas al la vortoj, al kiuj ili kuniĝas: ideon pri *parenceco* pro edziĝo aŭ edziniĝo; ideon pri *unuiĝo de ambaŭ seksoj* ĉe la sama linio de *parenceco*, kaj laŭ ĝenerala senco, kvankam ne estu *parenceco*; *kontraŭan ideon*, e: *bopatro; getajloroj*, koncernas ĉi tiu vorto, laŭ la unua ideo, la *tajloron kaj la edzinon; geinfanoj*, laŭ la ĝenerala senco, koncernas *infanojn kaj infaninojn; malbela*, respektive.

VIII. La sufikso *ĀĈ* donas ideon pri malbona kvalito morala aŭ materiala, pri manko da valoro; e: *libraĉo; ĉevalaĉo*.

AD donas ideon pri daŭrigo de la signifo de la radiko al kiu ĝi kuniĝas; e: *kantadi, laboradi*.

AĴ signifas ion konkretan faritan el la radiko al kiu ĝi kuniĝas, konkretan kvaliton, eksteran elmontradon de iu sento: *sukeraĵo* estas *io el sukero; bonoĵo*.

AN entenas ideon pri membro, loĝanto, partiano; e: *klubano; kristano, parizano*.

AR signifas kolekton el estaĵoj aŭ el aĵoj de la sama speco; e: *kolombaro* (sama speco); *ŝiparo* (en senco ĝenerala *ĉiaj ŝipoj*).

Estas necese atenti, ke la prefiksoj kaj sufiksoj estas memstaraj radikoj, kiuj per aldono de *o, a, k. c.*, fariĝas nomoj, adjetivoj, k. c.

### ·III,<sup>a</sup> LECIONO

DEMANDARO: I. Pronomo, divido de la pronomo, formoj de la personaj pronomoj kaj ilia deklinacio.—II. Signifo de *mem.* de *si* kaj de *oni*.—III. Posesivaj pronomoj kaj kiel oni devas apliki aŭ uzi *sia'n'*—IV. Korelativaj vortoj, iliaj formado, signifo kaj gramatikaj formoj.—V. Pronomoj demonstraciaj, rilatantaj-demandantaj, nedifinitaj, kaj iliaj gramatikaj formoj.—VI. Signifo de la prefiksoj DIS, EK kaj PRA.—VII. Klarigo de la sufiksoj EBL, EC, EG, EJ, EM, ER, ESTR kaj ET.

RESPONDARO: I. PRONOMO estas parto de la propozicio por anstataŭi la nomon, evitante ĉi tiun ripeti. Oni dividas la pronomojn laŭ jene: *personaj, posesivaj, demonstraciaj, rilatantaj-demandantaj kaj nedifinitaj*. La unuaj anstataŭas la nomojn de personoj kaj tiujn de animaloj aŭ aĵoj personigataj, kaj ili estas: *mi, ci* (apenaŭ uzata kaj anstataŭata de *vi*), *li,*

*ŝi, ĝi, ni, vi, ili* La deklinacio estas sama, kia estas tia de la nomo, kaj la formoj esprimataj ne varias.

II. *Mem* estas primitiva vorto uzata por intensigi, uzata pleonasme, t. e., uzata nenecese sed celante plifortigi la sencon de iuj nomoj, pronomoj kaj adverboj, kiujn ĝi akompanas; e: *ĉu vi vidis Johanon mem; ĉu li aŭdis vin mem; mi atendas vin ĉi tie mem.*

La reflektiva pronomo *si* estas de tria persono, kaj determinas ĝian uzon la tri jenaj reguloj: I.<sup>a</sup> Ĝi ne povas esti subjekto. nek parte subjekto; II.<sup>a</sup> Ĝi ne povas koncerni subjekton de unua kaj dua personoj; III.<sup>a</sup> Ĉiam ĝi koncernas subjekton de tria persono, kiu ajn estu la nombro kaj sekso; e: *li sin vundis per la tranĉilo; ŝi sin kombas.*

*Oni* estas uzata kiel nedifinita pronomo de tria persono por la du nombroj, ĉar oni uzas ĝin, kiam oni parolas ĝenerale pri io efektivigita de la homo: *oni rakontas.*

III. La *posesivaj*, pro la formo, estas veraj adjektivoj, ĉar ili finiĝas per *a* kaŭze de aldono de tiu ĉi vokalo al la personaj por formi ilin. Kiam ili iras solaj, anstataŭante la nomojn, ili estas pronomoj; kiam ili akompanas la nomojn, estas ili *posesivaj adjektivoj*: *mia, ĉia (via), lia, ŝia, ĝia, nia, via, ilia*. Oni deklinacias ilin same, kiel estas dirite, kaj ili havas la gramatikajn formojn de la multenombro kaj de la akuzativo; e: *mi havas miajn opiniojn; vi havas viajn*. De la reflektiva *si*, oni formas *sia, siaj, sian, siajn*, kaj por ĝin uzi estas necese ankaŭ atenti multe la tri regulojn donitajn por la uzo de *si*; e: *Petro parolis kun sia fianĉino; ili havas siajn opiniojn.*

IV. Korelativaj vortoj, kiuj ĝenerale estas interrilatigitaj duope, estas *kvardekkvin primitivaj vortoj*, lerte ordigitaj laŭ listo formanta tabelon sur preskaŭ ĉiuj lernolibroj, konsistanta el *naŭ serioj da kvin korelativaj vortoj po serio*, enkalkulanta nomojn; ad

jektivojn; pronomojn kaj adverbojn; ĉiuj tiuj ĉi vortoj estas fundamentaj, kun propra signifo, kaj oni povas uzi ilin kiel radikojn, kiam la senco tion permesas. La plej simpla maniero, por formi ĉi tiujn vortojn, estas la jena: konsideru la vokalon *i* kiel radikon, kun nedifinita signifo, tial ke ĉi tiu vokalo estas komuna al ĉiuj, al kiu oni povas aldoni la jenajn finiĝojn: *u*, por esprimi personecon kaj personigitajn bestojn kaj aĵojn, t. e., por esprimi pronomon; *o*, por esprimi aĵon (nomon); *a*, por esprimi klason, kvaliton (adjektivon); *e*, por esprimi lokon (adverbon); *al*, *el*, *am*, *om*, *es*, kvazaŭ sufiksojn kun la respektivaj signifoj pri *kaŭzo*, *maniero*, *tempo*, *kvanto* kaj *posedo*, formante tiel la *nedifinitajn vortojn*. De ĉi tiuj oni devenigos la ceterajn antaŭmetante, kvazaŭ prefiksojn, *nen*, por fari la *neajn*; la kousonanton *ĉ*, por formi la *kolektantajn*; la konsonanton *t*, por formi la *indikantajn* aŭ *demonstraciajn*, kaj la konsonanton *k*, por formi la *demandantajn-rilatajn*. El ĉi tiuj vortoj la finiĝantaj per *u* kaj *a* akceptas la *j* de la multenombro kaj la *n* de la akuzativo; la finiĝantaj per *o*, nur la *n*; la finiĝantaj per *e*, la *n* en especialaj okazoj, kiujn jam oni klarigos. Per la jena grafikaĵo facile estos al ĉiuj formi la korelativajn vortojn, irante de la *i* suben, en ĉiujn fakojn, oni formas *nedifinitajn*:

nen (neo)	ĉ (tuto)	k (rilato-demando)	t (indiko- demonstracio)
--------------	-------------	-----------------------	--------------------------------

i  
radiko

u (pronomo)	o aĵo (nomo)	a klaso (adjektivo)	e loko (adverbo)	al kaŭzo (adverbo)	el maniero (adverbo)	am tempo (adverbo)	om kvanto (adverbo)	es posedo (pronomo)
----------------	--------------------	---------------------------	------------------------	--------------------------	----------------------------	--------------------------	---------------------------	---------------------------



irante de *nen* al *i* kaj en ĉiujn subajn, fakojn. oni formas la *neajn*, kaj farante same, de ĉiu supra fako en *i* kaj subajn fakojn, oni formas la ceterajn. La demonstraciaj aŭ indikantaj, kiuj finiĝas per *u*, *o*, kaj *e* akceptas la partikulon *ĉi*, ĉu antaŭe, ĉu poste, por esprimi alproksimiĝon al la parolanto.

V. El ĉiuj vortoj tiel formitaj *tio*; *ĉi tio*; *tiu*, *tiu ĉi*; *tiuj*, *tiuj ĉi*; *ties*, estas demonstraciaj aŭ indikantaj pronomoj, fojojn, iuj el ili estas adjektivoj, kiam iras kune kun la nomo; *kio*, *kia*, *kioj*, *kiu*, *kiuj*, *kies*, estas rilatantaj aŭ demandantaj. Oni devas atenti, ke kiam la rilatanta anstataŭas la indikantan, tiu estas de la sama speco de ĉi tiu: *tio-kio*, *tia-kia*, *tiu-kiu*, *tiuj-kiuj*, k. c. Ankaŭ el la vortoj formitaj irante de la *i* en la finiĝojn, estas iuj, kiuj estas *nedifinitaj pronomoj* reprezentantaj personon, animalon kaj aĵon personigitajn, kiujn oni ne volas precizigi: *iu*, *iuj*, *ia*, *iaj*, *io*, *ies*, kaj same okazas al *neniu*, *nenia*, k. c. Tamen, estas aliaj esperantaj vortoj, kiuj, fojojn, estas kvazaŭ *nedifinitaj pronomoj*: *unu*, *ambaŭ*, *kelkaj*, k. c. Estas atentinde; ke tiuj, kiuj finiĝas per *es* estas neŝanĝeblaj, kaj ke oni aldonas la partikulon *ajn*, formante *iu ajn*, *kiu ajn*, *kies ajn*, k. c., de la nedifinitaj kaj rilatantaj, ĉiam kun signifo nedifinita.

VI. La prefikso DIS esprimas apartigon, dividon, distribuon: *oni disdonis la premiojn*; *la terkulturisto dissemas la tritikon*.

EK esprimas, ke stato, ago aŭ io, komenciĝas; signifas ion, kio estas momenta: *ekvidi*, *ekkanti*.

PRA donas ideon pri pasinteco pli-malpli proksima: *prahistorio*, *prauloj*, *prapatroj*.

VII. La sufikso EBL esprimas eblecon: *videbla* t. e., *ke oni povas vidi*, *la astro estas videbla*.

EC donas ideon pri la abstrakta kvalito entenata de la radiko: *mi amas vin pro via boneco*.

EG estas sufikso por formi la absolutan superlativon, kiel jam oni diris.

EJ estas aplikata por defini la lokon por tio, kion signifas la radiko al kiu ĝi kuniĝas: *lernejo estas la loko por lerni.*

EM difinas inklinton, tendencon, kutimon: *malla-borema estas persono, kiu ne ŝatas labori.*

ER. donas signifon pri la plej malgranda elemento el tuto: *polvero trafis mian okulon, kaj ĉi tiun plorigas ĝi.*

ESTR esprimas superan rangon: *la provincestro devigas la provincojn plenumi la ordonojn pri ĝenerala higieno.*

ET estas aplikata por formi la diminutivon; *birdeto, knabeto.*

#### IV.<sup>a</sup> LECIONO

DEMANDARO: I. Verbo, formoj, modoj tempoj, nombroj kaj personoj de la verbo. Konjugacio.— II. Finaĵoj de la verbo.— III. Helpanta verbo.— IV. Transitivaj, netransitivaj, reflektaj, reciprokaj, hazardaj aŭ okazaj, neŭtraj, nepersonaj kaj unupersonaj, kaj pasivaj verboj, kaj ilia kompleta konjugacio. V. Formoj kaj aplikado de la aktivaj kaj pasivaj participoj.— VI. Signifo de la prefiksoj EKS, RE, FI.— VII. Signifo de la sufiksoj ID, IG, IĜ, IL, IN, IND, ING, ISM kaj IST.

RESPONDARO: I. *Verbo* estas la ĉefa parto de la propozicio por esprimi la penson, kaj ĝi esprimas ekziston, staton, pasion, movon ĉu abstrakte, ĉu konkrete, koncerne tempon, nombrojn kaj personojn: *mi estas, vi staras, li kantis, ŝi amas, ili marŝos.* Ĝi havas du formojn, kiuj estas *aktiva* kaj *pasiva*, sed ne ĉiuj verboj havas la pasivan, kaj ĉi tiun oni formas pere la verbo *esti* kun la pasiva participo

de la verbo konjugaciata: *ami, esti amata; mi amos, mi estos amanta.*

La verbo esprimas la signifon diversmaniere, en senco ĝenerala laŭ formoj nomataj *modoj*; rilate al tempo, laŭ formoj nomataj *tempoj*. La *modoj* estas *kvar*: *infinitivo*, kun signifo tute abstrakta; *indikativo*, kiu jesas simple; *kondiĉa modo*, kun signifo dependanta de kondiĉo, kiu devas efektiviĝi antaŭe; *imperativo-subjunktivo*, kiu ordonas kaj petas. La *tempoj* estas *tri*: *estanta, pasinta kaj venonta* tempoj, la unua je la momento paroli; la dua je antaŭa momento al tiu de la parolo, kaj la tria post la momento de la parolo. La tempoj havas formojn simplajn kaj malsimplajn, sed oni rekomendas uzi prefere la simplajn; kaj ĉiu tempo havas *ununombron* kaj *multenombron*, kaj ĉe ĉiu nombro *tri personojn, unuan duan kaj trian*. Modoj, tempoj, nombroj kaj personoj formas tuton, kiun oni nomas konjugacio, kiu en Esperanto estas nur *unu* kaj absolute *regula*.

II. La finaĵo de la infinitivo estas ĉiam *i*. La finaĵoj de la simplaj tempoj estas: por la estanta, *as*; por la pasinta, *is*; por la venonta, *os*, ĉe la modo indikativa: *vi kantas, ŝi kantis, li kantos*. La imperativo-subjunktivo finiĝas ĉiam per *u*: *vi kantu aŭ kantu, ŝi kantu, ili kantu*. La kondiĉa modo finiĝas nur per *us*: *se mi parolus Esperanton, mi estus feliĉa*. Tio, kio starigas diferencojn inter nombroj kaj personoj, ĉe kiu ajn tempo de la esperanta konjugacio, estas nur la subjektoj: *mi vidis pentraĵojn, ili vidis pentraĵojn*.

III. En Esperanto la helpanta verbo estas nur *esti*. Per ĉi tiu verbo kun la participoj respektive necesaj (*anta-aj, inta-aj, onta-aj, ata-aj, ita-aj, ota-otaj*) oni formas la malsimplajn tempojn kaj la pasivan formon.

IV. Oni dividas aŭ klasigas la verbojn kaŭze de ilia

signifo, kaj tiel ili estas: *transitivaj*, verboj, kies signifo iras de la subjekto, kiu ĝin faras, en la komplementon, kiu ĝin suferas, kaj kiu estas *rekta komplemento* aŭ *akuzativo* ĉiam sen prepozicio: *la milito detruas la Homaron; netransitivaj*, kies signifo ne eliras de la subjekto mem: *la infano promenadas; la knabino mortis*. Kiam verbo esprimas direkton de movo ĉu fizike, ĉu spirite aŭ pense, la vorto aŭ vortoj al kiuj aliras la movo ricevas la finaĵon *n* de la akuzativo, kaj tiun ĉi akuzativon de direkto oni povas anstataŭi per prepozicia frazo. *mi veturis Madridon* aŭ *en Madridon; ili iris hejmen* aŭ *en la hejmon; la birdaro forflugis la arbaron* aŭ *en la arbaron*. Ankaŭ estas aliaj akuzativoj ĉiam specialaj, neniam rektaj komplementoj, pri *mezuro* en senco ĝenerala (*pezo, prezo, distanco, tempo, daŭro, vico, dimensio*): *la ŝtonego pezas du tunojn; la surtuto valoris dektri dolarojn; oni rajdis kvindek kilometrojn po unu tago; mi naskiĝis la dudekkvaran de septembro; la knaboj ludadis la tutan tagon; mi revenis la ĵus pasitan dimanĉon; mi parolos unuan vicon, vi duan; la dormoĉambro estas larĝa kvar metrojn kaj longa ses metrojn; li estas aĝa dudek jarojn*.

*Reflektaj* verboj estas tiuj, kies signifo naskata de la subjekto estas ankaŭ suferata de ĉi tiu, t. e., kun ĉi tiuj verboj la subjekto estas samtempe *aganto* kaj *suferanto*, kaj la suferanto estases primata de la persona pronomo anstataŭanta la subjekton kaj finiĝanta per la *n*, ĉar ĝi estas *akuzativo*: *la infanino kombis sin; ili ornamas sin*.

*Reciprokaj* estas la verboj, kies signifo iras de aganto al suferanto, kaj de ĉi tiu, kiu siavice estas subjekto aŭ aganto, al la antaŭa aganto, kiu samtempe estas suferanto, tial la subjektoj estas almenaŭ du, samtempe akuzativoj, suferantoj: *la knaboj helpas sin reciproke; la fraŭlinoj laŭdis unu la alian*. Ŝi

devas atenti, ke la reflektaj kaj reciprokaj verboj estas reale *specialaj transitivaj verboj*, aŭ *specialaj formoj de la transitivaj*.

*Hazardaj* aŭ *okazaj* verboj esprimas transformiĝon, ŝanĝon de stato, efektivigantan sen la volo aŭ partopreno de la persono, besto aŭ aĵo, kiu transformiĝas aŭ pasas de unu stato al alia; ili esprimas rezulton, kiun oni vidas kvankam ne la aganton, kiu ĝin produktas: *la knabino ruĝiĝis; la pordo fermiĝis; je la printempo la arbo verdiĝos*. Oni formas ilin pere la sufikso *iĝ*, kaj estas atentinde, ke hispanaj okazaj verboj havas la formon de la hispanaj reflektaj, sed estas grandega eraro konsideri ilin pro tio *reflektaj*, ĉar ĉi tiuj estas transitivaj, kiel jam estas dirite.

La *neŭtraj* verboj, kiel la netransitivaj, esprimas signifon, kiu ne eliras el la subjekto; tamen, kiam sekvas la verbon komplemento kun signifo sama, kiam la verbo esprimas, tiam tiu komplemento estas kvazaŭ rekta: *li mortis; li mortis trankvilan morton; li vivas: li vivas honoran laboreman vivon*.

*Nepersonaj* estas verboj, kies subjekto ne estas difinitiva, kies subjekto estas la pronomo *oni*: *oni konstruis la ponton; oni parolas malbone*.

*Unupersonaj* estas la verboj uzataj sen subjekto, tial oni devas nomi ilin *senpersonaj*: *pluvas, neĝas, tontras*. Vere la *nepersonaj* kaj la *unupersonaj* estas *senpersonaj*, sed tiel propre dirite la lastaj: *frostis, fulmos*, kiuj estas *esence, senpersonaj*, kaj la aliaj estas *akcidente* aŭ *circonstance senpersonaj*, kiam oni ne scias al kiu aljuĝi la verban signifon, kaj estas necese paroli laŭ ĝenerala senco.

La *pasivaj* reale ne estas apartaj verboj, sed la transitivaj, kiuj prezentigas laŭ alia formo, en kiu la akuzativo fariĝas subjekto, kaj ĉi tiu komplemento nerekte kunigata de la prepozicio *de*, kaj la verbo

uzata estas la helpanta *esti* sekvata de la pasivaj participoj de la transitiva verbo: *la infano estas ekzamenata de la tribunalo (la tribunalo ekzamenas la infanon)*.

V. La esperanta *participo* havas ses formojn, tri *aktivajn* kaj tri *pasivajn*, kaj reale ĝi estas alia parto de la propozicio, kies signifo, krom verba, povas esti substantiva aŭ noma, adjektiva kaj adverba, pro kio la participo povas finiĝi per *o*, *a* kaj *e*, akceptante la substantivaj kaj adjektivaj ĉion, kio al ili respektive koncernas pri sekso, multenombro kaj akuzativo. La tri aktivaj estas uzataj por formi la malsimplajn tempojn de la aktiva formo, kaj ili estas: *anta-aj*, *inta-aj*, *onta-aj*, por la estanta, pasinta kaj venonta tempoj; la tri pasivaj estas: *ata-aj*, *ita-aj*, *ota-aj*, por formi tiujn de la pasiva formo. Oni aplikas la participojn laŭ la jeno:

Por la *simplaj tempoj de la progresanta aktiva formo* t. e., *de la tempoj kun gerundio*, oni uzas *anta-antaj*: *mi estas skribanta* (aŭ *skribadas*) *la tutan matenon*; *ŝi estis parolanta* (aŭ *paroladis*) *senĉese du horojn*; *ili estos studentaj* (aŭ *estudados*) *dum la tuta tago*.

Por la *malsimplaj tempoj de la ordinara aktiva formo*, oni uzas *inta intaj*: *mi estas laŭdinta vian pensmanieron*; *ŝi estis kombinta sian filineton*; *morgaŭ la knaboj estos lernintaj la lecionon*.

Por la *perifrazaj* aŭ *ĉirkaŭirantaj tempoj*, t. e., por la *devigaj tempoj* aŭ *tempoj* kiuj portas antaŭe la verbon *devi* oni uzas *onta-ontaj*: *mi estas legonta libron*; *la generalo estis atakonta la fortikaĵon*; *la atakontoj estos transirontaj la riveron*.

Por la *simplaj tempoj de la ordinara formo*, *ata-ataj*: *vi estas laŭdata de via profesoro*; *li estis punata de sia patrino*; *ili estos premiataj de la publiko*.

Por la *malsimplaj tempoj de la ordinara pasiva*

formo, *ita-itaj*: *li jam estis laŭdita de la urbestro; ni estas persekutitaj de niaj malamikoj; la lernanto estos ekzamenita, kiam mi alvenos.*

Por la *simplicaj* perifrazaj tempoj de la *pasiva* formo, *ota-otaj*: *mi estas punota pro mia malobee-  
mo; la laboro estis finota je la sunsubiro; la fortikaĵo  
estos atakota antaŭ la sunleviĝo:*

Per la jenaj tabeloj tute facile oni trafos la klarigi-  
tajn aplikadojn:

Mi vizitas knabinon dimanĉon je la tria posttagmeze

Parolante	Sabato: Morgaŭ je la tria posttagmeze	Dimanĉo: Hodiaŭ je la tria posttagmeze	Lundo: Hieraŭ je la tria posttagmeze
Matene	Mi estos vizitonta ŝin	Mi estas vizitonta ŝin	Mi estis vizitonta ŝin
Posttagmeze	Mi estos vizitanta ŝin	Mi estas vizitanta ŝin	Mi estis vizitanta ŝin
Vespere	Mi estos vizitinta ŝin	Mi estas vizitinta ŝin	Mi estis vizitinta ŝin



# P A S I V A F O R M O

## Kaj la knabino

Parolante	Sabato: Morgaŭ je la tria	Dimanĉo: Hodiaŭ je la tria	Lundo: Hieraŭ je la tria
Matene	Estos vizitota	Estas vizitota	Estis vizitota
Posttagmeze	Estos vizitata	Estas vizitata	Estis vizitata
Vespere	Estos vizitita	Estas vizitita	Estis vizitita

VI. La prefikso EKS donas signifon pri io, kio estas, sed jam ne estas, pri estinta rango: *eksprovincestro, eksrektoro*.

RE esprimas ripetadon: de *fari, refari*.

Iujn adverbojn, prepoziciojn eĉ interjekcion *fi*, oni uzas kiel prefiksojn: *en* donas ideon pri movo de ekstere internen, kaj *el* la malan ideon, movon de interne eksteren, aŭ elĉerpon el tuto; *sen* esprimas absolutan mankon de tio, kion signifas la radiko al kiu ĝi kuniĝas; *ne* donas nean signifon, kiu povas malaperi. Estas necese atenti multe pri uzado de *sen*, *ne* kaj *mal*, ĉar konfuzo kaj neĝusteco povas okazi.

VII. La sufikso ID aldonas ideon pri origino, deveno, filo: *ĉevalido; kokidojn vigle zorgas kokino*.

IĜ donas transitivan verban signifon al radikoj, ĉu verbaj, nomaj, adjektivaj, al adverboj, prepozicioj, prefiksoj kaj sufiksoj: *mortigi, kolorigi, blankigi, antaŭenigi, enigi, disigi, anigi*.

Pri IĜ jam oni parolis por formi la hazardajn aŭ okazajn verbojn: *paliĝi, verdiĝi*. Ĉi tiu sufikso same, kiel la antaŭa, kuniĝas al verbaj, nomaj kaj adjektivaj radikoj, al adverboj, prepozicioj, prefiksoj kaj sufiksoj.

IL donas ideon pri io por fari tion, kion la radiko signifas: *kudrilo, pentrilo*.

IN donas signifon pri virinsekso: *hundino, najbarino*.

IND signifas, ke iu aŭ io meritas tion, kion la radiko signifas: *la pejzaĝo estas pentrinda*. Atentu ne konfuzu *ind* kun *ebl*.

ING aldonas signifon pri objekto en kiun oni enmetas parte alian aĵon, kiun difinas la radiko al kiu ĝi kuniĝas: *kandelingo*.

ISM difinas sistemon, doktrinon: *Esperantismo*.

IST estas por esprimi profesion, okupon, metion: *ĉarpentisto*.

## V LECIONO

DEMANDARO: I. Adverbo, ĝia loko en la frazo, karakterizo de la devenata adverbo; gradoj de la adverboj, kaj formado de la komparativa kaj superlativa gradoj; prepozicio postulata de la kvanta adverbo; adverboj uzataj kiel prefiksoj; formoj *kiel eble plej...*; *ju pli... des pli* kaj aliaj devenantaj de ĉi tiu lasta.—II. Prepozicio, ĝia celo; kiun lokon ĝi okupas, kiujn kazojn ĝi regas; kiuj prepozicioj povas iri antaŭ infinitivo kaj antaŭ la konjunkcio *ke*.—III. Kiajn rilatojn esprimas la prepozicioj. Rimarkoj pri *al* kaj *ĝis*. Prepozicioj uzataj kiel prefiksoj.—IV. Konjunkcio; ĝia divido.—V. Interjekcio; ĝia loko en la frazo.—VI. Signifo de *ajn* kaj *moŝto*.—VII. Sufiksoj UJ, UL, UM.

RESPONDARO: I. *Adverbo* estas la parto de la propozicio modifanta la signifon de verbo, de participo, de adjektivo kaj alia adverbo; ĝi estas al tiuj ĉi partoj de la propozicio same, kiel la adjektivo al nomo: *mi kantas laŭte*; *ŝi estas tre amata de siaj gefiloj*; *li restis tute trankvila*; *ili lernis sufiĉe baldaŭ*.

Oni dividas ĝin laŭ jene: *fundamentaj*, kiuj estas vortoj primitivaj, pure radikaj, kun propra valoro kaj adverba signifo: *baldaŭ*, *nur*, *jes*, k. c.; *gramatikaj*, kiuj devenas de radikoj nomaj, adjektivaj, verbaj, adverbaj kaj de prepozicioj, de afiksoj: *vere*, *klare*, *prefere*, *jese*, *antaŭe*, *pere*, *dise*, *eble*. La adverbulo iras apud la verbo aŭ vorto, kiun ĝi modifas, kaj la karakterizo de la gramatika aŭ devenata adverbo estas la finaĵo *e*.

Krom la klarigo aŭ divido montrita, ankaŭ oni dividas la adverbojn laŭ ili koncernos *tempon*, *kvan-ton*, *kaŭzon*, *lokon*, *manieron*, *klason*, *ordon* aŭ *vi-*

*con, jeson, neon, dubon*. La adverboj pri tempo respondas la demandon «*Kiam?*»: *nun, tuj, ĵus, baldaŭ, iam*, k. c.; la *kvantaj* respondas la demandojn «*Kiom?*», «*Kiom da?*»: *tro, multe, sufiĉe, neniom*, k. c.; *tiuj, kiuj* respondas la demandojn «*Kie?*», «*De kie?*», «*Al kie?*», «*Tra kie?*», estas *lokaj*: *ĉie, apude*, k. c.; estas *manieraj, klasaj kaj ordaj*, *tiuj, kiuj* respondas la demandon «*Kiel?*», kaj la lastaj ankaŭ respondas la demandon «*En kiu vico?*»: *bone, laŭ, supraĵe, unue, iel*, k. c.; *jesaj, neaj, kaj dubaj* adverboj respondas la demandojn «*Ĉu ne?*», «*Ĉu estas vero?*», «*Ĉu vere?*»: *jes, ne, eble, supoze*, k. c.

La tri gradoj de la adverbo estas *pozitiva, komparativa* kaj *superlativa* same, kiel oni diris pri la adjektivo; *pozitiva*: *mi leviĝas frue*; *komparativa*: *mia amikino dancas pli bone, ol via amiko*; *tiu fraŭlino parolas tiel korekte, kiel la profesoro*; *la knabo prononcas malpli bone, ol la knabino*. Oni formas la *superlativan* ankaŭ same, kiel oni diris pri la adjektivo.

La prepozicio postulata de la kvantaj adverboj estas *da*, kaj post ĝi la nomo neniam devas esti laŭ akuzativa formo: *oni aĉetis sufiĉe da drapo por la surtuto*.

Oni uzas kelkajn adverbojn kiel prefiksojn: *tro, for*, k. c.; kaj estas necese atenti pri la formoj tre uzataj *kiel eble plej...*, kaj *ju pli... des pli* kaj kombinoj pri ĉi tiu lasta.

II. *Prepozicio* estas la parto de la propozicio, kiu esprimas *kuniĝon* kaj *dependon* inter du vortoj, kaj determinas la klason de dependo aŭ de rilato ekzistanta inter ili: *la dentoj DE leono*. La prepozicioj en Esperanto havas *precizan signifon* kaj oni metas ilin *antaŭ* la vortoj, kiujn ili regas, kaj *inter* la vortoj kiujn ili kunigas aŭ rilatigas: *li venas DE Ameriko*;

*mi aketis ŝlosilon POR knaboj; ĵetu ŝtonojn INTER la arboj.*

Nur tri prepozicioj povas iri antaŭ infinitivo en Esperanto: *anstataŭ, antaŭ ol kaj por*; kaj antaŭ la konjunkcio *ke* povas iri *malgraŭ* kun verbo en indikativo, kaj *por* kun verbo en imperativo-subjunktivo: *antaŭ ol manĝi, lavu viajn manojn; anstataŭ ludi, vi devas studi; por scii estas necese studi; li anoncos per Esperanto, malgraŭ ke li ne lernis la lingvon; mi klarigas, por ke vi lernu.*

III. La prepozicioj povas esprimi rilatojn pri *situacio aŭ loko* kiel *ĉe, en, apud, inter, sub, sur, super, antaŭ, post, trans, ekster, ĉirkaŭ*, k. c.; pri *movo aŭ direkto*: *de, el, al, ĝis, en, super, preter, tra*, k. c.; pri *kvanto*, kiel *da, el, po, krom*, k. c.; pri *kaŭzo*, kiel *pro, de*; pri *tempo*, kiel *je, dum, por*; pri *maniero*, kiel *per*; pri *posedo* (genitivo), *de*; pri *ago*, kiel *kontraŭ, spite de, krom*; pri *escepto*, kiel *krom, ekster*; pri *komenco* rilate *al tempo kaj spaco, de*; pri *celo, por*; pri *temo, pri*; pri *akompano kaj koincido, kun*; pri *manko, escepto kaj foresto, sen*; pri *analogieco, komformeco, plano, rezultato, laŭ*. Ĉiam, kiam okazu dubo pri la prepozicio uzota, uzu la nedifinitan *je*.

La prepozicioj *al* kaj *ĝis* tute precize difinas finon de la movo aŭ direkto, tial kun ili oni ne povas uzi la akuzativon de direkto: *mi iras al la promenejo; mi vojaĝas ĝis Parizo*. Estas necese atenti multe pri la akuzativo de direkto akompanata de prepozicio, ĉar ĉi tiu signifas, ke la celo estas atingita irante de ekstere internen: *mi iras en Parizon* signifas, ke *mi vojaĝas al Parizo*; kaj *mi iras en Parizo* signifas, ke *mi estas en Parizo de antaŭe*, kaj ke *mi iras ĉe la internaĵo de Parizo, tra ĝiaj stratoj* k. c.

Oni uzas iujn prepoziciojn kiel prefiksojn: *el, en, sur, sen, tra, preter, al*, k. c.

IV. Per unu propozicio oni esprimas tute klare ju-

ĝon, t. e., kompletan penson pri io, aljuĝante, jesante aŭ neante, al tio difinitajn kvalitojn; ankaŭ per ĝi, oni esprimas, ke io estas, ekzistas, transformiĝas, okazas, k. c. Propozicio, do, estas aro el vortoj, kun preciza absoluta sendependa signifo, en kiu ĉiu el ili havas precizan rolon, kaj en kiu ĉiuj vortoj estas interrilatigitaj precizmaniere. Sed multfoje, la penso estas esprimata de aro el propozicioj, el kiu unu estas la ĉefa kaj la ceteraj dependantaj de la ĉefa. La neŝanĝebla vorto, kiu ligas la propoziciojn, estas *konjunkcio*. Tamen, ankaŭ ĉi tiu povas ligi vortojn, kaj, je tiu ĉi okazo, estas necese ne konfuzi la konjunkcion kun la prepozicio: ĉi tiu starigas *dependon* inter la vortoj, donas *malsaman gramatikan valoron* al la vortoj, kiujn ĝi kunigas; la konjunkcio starigas *paralelismen* inter la vortoj, kiujn ĝi kunigas, donas *saman gramatikan valoron* al vortoj kiujn ĝi ligas, ĝi ligas du aŭ pli subjektojn de sama verbo, du aŭ pli substantivojn, du aŭ pli komplementojn, k. t. p.

La konjunkcioj estas *kunligantaj*: *kaj, nek, ke: oni diras, KE la profesoro KAJ la lernantoj promenis hodiaŭ matene, sed mi ne vidis la profesoron, NEK la lernantojn. Diskunigantaj*, kiuj esprimas *apartigon, izoligon, alternativon: aŭ, ĉu, jen*, ankaŭ oni povas konsideri ilin *distribuantaj*. Ĉi tiujn konjunkciojn oni ripetas, kiam ili esprimas eblan elekton, kapricon, kaj hazardon, oni uzas *aŭ... aŭ: oni uzas ĉapelon, aŭ ĉapeton, aŭ kaptukon; jen... jen*, kiam oni esprimas alternativajn ŝanĝojn: *jen oni uzos la anglan lingvon, jen la francan, jen la germanan, jen la hispanan, la malfacilaĵoj por la internaciaj rilatoj ne estos solvotaj; ĉu... ĉu*, kiam oni esprimas dubon: *oni ne scias, ĉu li venos, ĉu ne. Kontraŭaj* starigas rilatojn pri *maleco, nekomformiĝo*, inter tio, kio antaŭestas, kaj tio, kio sekvas: *kvankam, sed*,

*malgraŭ, tamen, kontraŭ, almenaŭ*, kaj estas atentinde, ke antaŭ propozicio esprimanta *cedi*, oni uzos *kvankam*; antaŭ propozicio esprimanta *fortan malcedon* aŭ *kontraŭstaron* koncerne la antaŭan propozicion, oni uzos *tamen*: *mi klarigis al vi tion, kio estas esperanto, kaj kvankam vi aŭskultis min atente, sed ne fideme, tamen vi ne vin montris favora je la lingvo. Kondiĉaj ligas esprimante kondiĉon, cirkonstacion aŭ supozon, kiu nepre devos efektiviĝi, por ke ankaŭ la antaŭa propozicio efektiviĝu: se, kondiĉe ke, kun la kondiĉo ke: se oni scias esperanton, oni povas interrilatiĝi kun ĉiuj civilizitaj nacioj; mi vin pardonas kondiĉe ke vi ankaŭ pardonu la ceterajn. Kaŭzaj kunigas propoziciojn kaŭzatajn de la antaŭaj: ĉar, tial ke, pro tio ke: hodiaŭ mi ne klarigos lecionon, ĉar mi estas malsana; pro tio ke la kapo doloras min. Komparantaj starigas komparon; same kiel, tiel kiel, pli ol. Daŭrigantaj starigas apogon por daŭrigi la disvolviĝon de aliaj pensoj, kiuj ne estas necesaj, kaj kiujn oni povas forigi sen danĝero por la klareco aŭ kompleteco de la senco: do, nu, fine, laste, tiel do: vi jam scias parton de la leciono, nu, ni daŭrigu la laboron. Finaj ligas la antaŭajn propoziciojn kun tiu, kiu esprimas la celon, kiun oni pensis, diris aŭ planis: por ke, ĉar: studu esperanton, celu, paroli kaj skribi ĝin bone, por ke vi helpu la movadon, nian komunan laboron. Sekvaj deduktas la konsekvencon de tio, kion oni esprimis, kunigante la esprimitaĵon kun la konsekvenco aŭ sekvo: do, tiel, sekve, tial: mi ne havas monon, tial mi ne vojaĝos. Mi forveturos hodiaŭ, por aliri al la Kongreso, kaj ni jam ne vidos nin denove ĝis mia reveno; do, ĝis revido, fartu bone.*

V. *Interjekcio* estas la parto de la propozicio, ĉu vorto sola, ĉu frazo, ĉu ekkrio nur, per kiu oni subite esprimas emociion aŭ senton pro doloro, ĝojo,

surprizo, timo, dubo, deziro, aŭ pro io ajn: *ve, fi, ha, ho, ho ve, for*, k. c. Ĝin povas akompani la ploro, la rido, gesto kaj eĉ sintenadoj, kaj la dividon oni konscios por la signifo mem. La loko de la interjekcio estas tiu, en kiu plej efike esprimas la emoción aŭ senton: *ve, mi perdis la patrinon! Brave, antaŭen Esperantistoj! Hontu, kanajlo!*

IV. *Ajn* estas partikulo por tute nedetermini la signifon de la vorto, kiun ĝi sekvas: *kiu ajn diris tion, mensogis; aĉetu libron ajn; por mi estas same. Moŝto* signifas titolon esprimantan rangon, ĝentilecon, respektemon, al kiu ĝin oni donas, kaj ĝi estas ĝenerala titolo: *Lia Ministra Moŝto; la Rektora Moŝto salutis la gestudentojn.*

VII, UJ estas sufikso, kiu signifas ĉu objekton aŭ skatolon por enteni tute tion, kion signifas la radiko al kiu ĝi kuniĝas: *monujo*; ĉu nacion: *Hispanujo*; ĉu arbon, kiu donas frukton: *pirujo*, kvankam oni povas formi la nomon per la radiko de la frukto antaŭ la vorto *arbo*. Pri la nomoj de nacioj oni devas atentigi multe konservi fidelecon al la *Fundamento*, kaj pri tiuj de provincoj kaj urboj aldoni nur la finaĵon *o* al la nomoj, aŭ konservi ilin tute same sensanĝe: *Brandeburgo, Provenco, Breslau, Versailles*, k. t. p., kvankam iuj nomoj de gravaj urboj esperantiĝis, kiel *Parizo, Ĝenevo, Kopenhago*.

UL aldonas al la radikoj signifon pri persono, kiun karakterizas la radiko mem: *malsanulo, riĉulino*.

UM estas sufikso nedeterminata, tre grava, por ĝin apliki, kiam oni ne povas precize apliki, iun el la ceteraj: oni ne povas diri *origi*, ĉar *origi* estas fabriki oron, por similigi oraĵon, sed *orumi; arĝentumi; ventumi; ventumilo; kuprumi; kolumo; manumo; botonumi*; k. c.



## VI.<sup>a</sup> LECIONO

DEMANDARO: I. Bazo kaj helpantaĵoj por la formado de vortoj en Esperanto.—II. Gramatika familio kaj ĝia senlima aplikado al ĉiuj radikoj.—III. Nomaj, adjektivaj, verbaj, adverbaj, prepoziciaj, prefiksaj kaj sufixaj radikoj.—IV. Tri klasoj el kunmetitaj vortoj.—V. Pri propraj kaj fremdaj nomoj.—Sufiksoj ĈJ kaj NJ.

RESPONDARO: I. La bazo por formado de vortoj en Esperanto estas la radiko; la helpantaĵoj estas la *afiksoj*, la *kunmetitaj vortoj* kaj la *finajĵoj*. (Oni prezentos ekzemplojn.)

II. Oni nomas la kvin vokalojn *gramatika familio*, per ili la radikoj akiras propran signifon laŭ okazo: *ami, amo, ama, ame, amu; jese, jesi, jesa, jeso, jesu*; k. c.

III. Radiko estas la elemento entenanta la fundamentan ideon de la vorto, kaj ĝi povas esti unusilaba, kiel *am-i, man-o*; aŭ plursilaba, kiel *signif-i, labor-o*. Ĝi povas esti noma: *patro, ĉevalo, domo*; adjektiva: *bona, klara, bela*; verba: *preferi, gajni, ĝoji*; adverba: *ĉiama, tuja*; prepozicia: *kunigi, peranto*; prefiksa: *praulo, disigi, malo, eko*; sufixa: *aro, ingo, ujo*.

IV. En Esperanto oni povas formi *tri klasojn* el kunmetitaj vortoj: 1.<sup>an</sup> el radikoj kun finaĵo: *najbar-o, kolomb-o*; 2.<sup>an</sup> el radikoj kaj afikso aŭ afiksoj: *vilaĝ-an-o, mal-san-ul o, mal-san-ul-ej-o, el-ĉerpit-aj-o, mal-bon-a*; 3.<sup>an</sup> el kombinaĵo el radikoj kun aŭ sen afiksoj: *mar-bord-vilaĝ-an-o*, sed estas rekomendinde ne formi longan kunmetitan vorton. En ĉi tiuj lastaj vortoj la lasta radiko estas *determinata* de la antaŭaj radikoj, kiuj tial estas *determinantoj*, kaj estas facile trovi la signifon diskunmetante la

vorton de la fino en la komenciĝon, tiel: *ano de vilaĝo de la bordo de la maro*; en ĝi *bordo kaj maro* estas sen la finaĵo *o* kaj *determinantaj radikoj*. Kiam pro kuniĝo de radikoj por formi kunmetitan vorton, malaperigante la finaĵon de determinanta radiko, rezultus kuniĝo el konsonantoj malfacile prononcebla, oni povas konservi la finaĵon: *verdastelano* aŭ *verdastelano, lernolibro*.

V. La propraj kaj fremdaj nomoj adaptiĝas al la esperanta lingvo laŭ la Fundamento, alprenante ortografion kaj finaĵojn, kaj pri tiuj de nacioj, provincoj kaj urboj jam estas dirite, kiam oni klarigis la sufikson UJ. Praktiko donos la korektan uzon: *Petro, Jozefo, Julio, Vilhelmo, Henriko, Mario*, k. c.; *Vaŝintono estas ĉefurbo de Usono*.

VI. ĈJ signifas ameman diminutivon por nomoj de viro, kaj NJ por tiuj de virinoj. Oni devas aldoni ilin post la du unuaj literoj almenaŭ, sed ĉiam evitante povu okazi konfuzo: *Julĉjo, Julnjo; paĉjo, panjo*; se ni dirus *Joĉjo-Jonjo* okazus konfuzo, ĉar oni ne scius ĉu oni koncernas *Johanon-Johaninon* aŭ *Jozefon-Jozefinon*.

#### RIMARKOJ:


Kiel oni faras demandojn esperante? Komencante per unu el naŭ demandantaj vortoj de la tabelo el korelativaj vortoj: *kiu, kio, kie*, k. c.: *kiuj estas la tagoj de la semajno? Kiom da libroj vi havas? Kia besto estas azeno? Kiu estas tie? Kial vi plendas ĉiutage?* Kaj se ne estus demandanta vorto ĉe la komenco, tiaokaze oni komencos per *ĉu*, partikulo sen signifo en ĉi tiu okazo: *ĉu vi iam sendis telegramon esperantlingve? Vi manĝis la tutan kukon, ĉu ne?*

Facile estas respondi per la sama demando kun iuj aldonaĵoj kaj ŝanĝoj: *ĉu vi lernas Esperanton?*

*Jes, jam mi lernas la lingvon, aŭ ne, mi ne lernas Esperanton.* Kiam en la respondo oni silentas pri la verbo de la demando, oni esprimas klare la kazon regatan de la verbo: *Kien vi iras? En la lernejon Kiom kostis la libro? Dudek pesetojn. Al kiu vi donis la pupon? Al la infanino.* Komence estas dece kaj konvene fari la kompletan respondon por ripetadi la vortojn.

Celo de la profesoroj devas esti paroligi la lernantojn kiel eble plej baldaŭ, sekvi la metodon, kiun Naturo montras al ni: *kutimigi* de la unua momento la aŭdon de la lernantoj per frazoj klarigantaj alfabeton kaj literprononcadon, tradukante ilin poste al patra lingvo; *demandi* pri la frazoj por devigi la lernantojn konservi ĉe la memoro vortojn, formante tiel al ili ilian leksikonon; okaze de demandoj kaj respondoj, koncize, de tempo al tempo, klarigi regulon, eĉ utiligante ĉiajn procedojn, grafikaĵojn, anekdotojn, mimikaĵojn, k. c., por komprenigi kaj devigi la lernantojn trafi celon kaj respondon, ĉar ĉi tiu procedo forigas monotonecon, allogas lernantojn, altiras intense atenton ĉies, agrabligas lernadon.





# ATENTU!

HISPANA ESPERANTO-ASOCIO celas unuigi la enlandajn esperantistojn por plej bone influi ĉiajn naciajn rondojn al Esperanto, eĉ la Registaron, prezentante sin multenombra, potenca, serioza kaj tute neŭtrala politike, religie kaj socie; celas esti profitdona al la samideanaro mem, ĉar, ne nur per granda potenca Unuiĝo, ĝi sin montros inda je atento ĉies, sed ĝi havigos al si la necesajn rimedojn por akceli la triumfon de nia celo kaj liveri malkare, eĉ senpage kiam eble, propagandan materialon. Dezirinde estas, ke ĉiuj samideanoj aliĝu kiel eble plej rapide al la Asocio; ke je la fino de ĉiu jaro oni pagu la kotizon por la sekvanta, ĉar akurateco kaj ĝustatempa amasigo da kotizoj faciligas ĉion kaj liveras bazon por plej efika plano; ke ĉiu celu varbi novajn adeptojn kaj sin decidu esti ekzamenata, por havigi al si la diplomojn pri elementa kaj supera Esperanto-kapableco de nia Instituto, kiu orde kaj en plena interkonsento kun la Asocio, kvazaŭ ĝia Fako, laboras. La kotizo estas DU PESETOJ, unuan jaron oni devas aldoni 50 centimojn pro la Membrokarto. Konstatinde estas, ke H. E. A. lasas plenan liberecon al enlandaj samideanoj por arigi loke, regione, eĉ ideale, laŭ memvola decido, kaj

ĉar H. E. A. konscias, ke eĉ oni devas starigi tiujn arigojn tute aŭtonomajn, tial ke loke, regione, idealronde, ili plibone plenumos la disvastigon de la komuna afero, ĝi kunlaboradis por starigi la Asturian Federacion kaj nun aktive helpas samideanojn de Galicia por ĉi tie fondi Grupojn kaj Federacion.

Rekomendinde estas, ke ĉiu aliĝinta samideano sendu ankaŭ TRI PESETOJN por havigi al si la gazeton «Hispana Esperanto», kiu siavice donacos al pagintoj iujn librojn, kaj kiu informos lin pri la enlanda kaj eksterlanda movado, pri la aferoj de la Asocio, ĉar ĉion pri ĉi tiu ĝi aperigas. Atentu, ke ju pli da subtenantoj kalkulu la gazeto, despli interesa ĝi estos, ĉar estos des pli multenombraj ĝiaj paĝoj.

Pri la Asocio, Instituto kaj Gazeto, oni devas sin turni al la Sekretario de H. E. A., S-ro Mariano Mojado.—Abascal, 13. Madrid.

Ĉiu aliĝinto al H. E. A., paginte por ricevi la gazeton Hispana Esperanto, rajtas trionon da rabato el la prezoj fiksitaj por la jenaj verkoj de J. Mangada Rosenörn: «HELPANTA TEMARO», 0,75; AVILA, 1 pt.; EL MODERNA HISPANA PARNASO, 1,15 pt.; PRI HISPANUJO KAJ ĜIAJ POPOLKANTOJ, 1 pt.; DU JUNAJ FRAŬINOJ kaj KORNELIINO de Cervantes, 1,75.

## PRESEŖAROJ

DIRAS

DEVAS DIRI

---

3. <sup>a</sup> paĝo, 17. <sup>a</sup> linio: Ludovico.	Ludoviko.
9. <sup>a</sup> paĝo, 13. <sup>a</sup> linio: ĉiam.	ĉiam.
9. <sup>a</sup> paĝo, 13. <sup>a</sup> linio: profesión, metión.	profesion, metion.
31. <sup>a</sup> linio; estelo.	stelo.
11. <sup>a</sup> paĝo, 4. <sup>a</sup> linio: esprimmanieron.	esprimmanieron.
24. <sup>a</sup> linio: tridekria.	tridektria.
18. <sup>a</sup> paĝo, 3. <sup>a</sup> linio: difini.	difini.
20. <sup>a</sup> paĝo, 27. <sup>a</sup> linio: estas primata.	estas esprimata.
21. <sup>a</sup> paĝo, 23. <sup>a</sup> linio: difinitiva.	difinita.
22. <sup>a</sup> paĝo, 26. <sup>a</sup> linio: kombinta.	kombinta.